# TEA-BULTENO

1ª JARO — APRILO 1998 — NUMERO 3

## AGENDO

| | | |
|---|---|---|
| 1 | M | Laboroj por A-A Konferenco |
| 2 | Ĵ | |
| 3 | V | Laboroj por A-A Konferenco |
| 4 | S | |
| **5** | **D** | |
| 6 | L | Konversacia rondo |
| 7 | M | Laboroj por A-A Konferenco |
| 8 | M | |
| 9 | Ĵ | |
| 10 | V | |
| 11 | S | |
| **12** | **D** | |
| **13** | **L** | |
| 14 | M | |
| 15 | M | |
| 16 | Ĵ | |
| 17 | V | Raportoj pri la 10ª Alp-Adria Konferenco |
| 18 | S | |
| **19** | **D** | |
| 20 | L | Konversacia rondo |
| 21 | M | Babilad-vespero pri aktualaĵoj |
| 22 | M | |
| 23 | Ĵ | |
| 24 | V | Ekskurso tra la vortaro: denove en kuirejo! |
| 25 | S | |
| **26** | **D** | |
| 27 | L | Konversacia rondo |
| 28 | M | **90-jariĝo de Universala Esperanto-Asocio** |
| 29 | M | |
| 30 | Ĵ | |

**Ĉiuj al Lignano de la 8ª ĝis la 14ª de aprilo!**

## Vortoj de la redakcio

Ĉiu tago de la jaro havas en si mem kialon por memorigi pri io grava. Tutcerte aktiva esperantisto, komence de ĉiu jaro, cirklas ruĝkrajone sur la kalendaro la plej signifajn datojn, dum kiuj nepras organizado de ia aranĝo, en formo pli-malpli grandskala, por inde reliefigi la koncernan datrevenon. Verdire ne multas tiaj tagoj, kvankam oni povus eĉ preteksti motivojn por festi, ĉefe se per tio ni sukcesas eliri el nia ŝelo por konigi nin al ekstera publiko. Sed atentu, ke la kialo estu inda kaj valora kaj serioza, ĉar ridindecon kaj mokemon ni absolute devas eviti!

Ĉi-monate tamen ni ne devas elpensi ion novan, ĉar la 28ªⁿ de aprilo ni kunfestos la fondiĝdatrevenon de la plej grava instanco de nia movado, nome **Universala Esperanto-Asocio**! Kiam oni aŭdas/legas pri la siglo UEA, neniu aŭdacas demandi: pri kio temas? ĉar ĝi estas ĉie kaj de ĉiuj konata. Sed... ĉu vere? Ĉu vere vi scias kio ĝi estas, kiel kaj kial ĝi naskiĝis, kiuj estis kaj estas ĝiaj celoj, kiom da problemoj ĝi alfrontis en sia 90-jara ekzistado? Kiam, ekzemple, ekfontis la ideo de organizîĝo internacia? Kiu estis la realiginto de tiu ideo?

Jen la ĝusta momento por, skize kaj koncize, doni kelkajn informojn pri la tiel dirita «tegmenta organizaĵo por Esperanto-parolantoj».

La ideon pri fondo de iu internacia asocio, ariganta «la amikojn de nia afero», jam dekomence havis Zamenhof mem kaj pri tio li insistis en la 3ª numero de la gazeto LA ESPERANTISTO, proponante la kreon de Tutmonda Ligo de Esperantistoj (dec. 1889). Sed pasis 19 jaroj antaŭ ol realiĝu tiu revo, malgraŭ ke, intertempe, pli kaj pli da homoj persiste subtenadis ĝin. Decidaj estis la Unua UK en Bulonjo (1905) kaj iasence la Idoskismo plus la valora iniciatemo de la 21-jara sviso Hector Hodler. Je la fondo-momento, estis fiksitaj en Statuto la celoj de UEA, kies fundamentaj principoj, kun etaj modifoj, validas ankoraŭ hodiaŭ. Esenca diferenco en la strukturo kompare kun la nuna estis, ke ĝi tiam konsistis el nur individuaj membroj. En 1936 estis fondita **Internacia Esperanto-Ligo**, kiu estis federaciigo de la landaj organizaĵoj. Ĉi tiu havis sian sidejon en Heronsgate, apud Londono, dum UEA en Ĝenevo. Sed entute ne kontentigis la esperantistaron la ekzisto de du samcelaj institucioj, kaj tiu malaprobo favoris la vojon al kreo de unueca organizaĵo: la 28ªⁿ de aprilo 1947 okazis la kunfandiĝo de la du societoj en ununuran asocion kun la nomo **Universala Esperanto-Asocio.**

Jen prezentita, tre tre modeste kaj malmultvorte, la historio de la plej grava instanco de la Esperanto-movado. Ĝi meritus pli ampleksan artikolon, pli fundan pristudadon, plurlibran konsultadon: ja, 90 jarojn da intensa vivo oni ne povas resumi en kelkaj linioj. Espereble tiuj utilis kiel instigilo por plua, pli detala esplorado pri ĉiuj aspektoj de ĝiaj agado, laboro, progresado, celaro k.s., ekde ĝia naskiĝo ĝis la nuntempo.

Ni rememoru la kvar fundamentajn celojn de UEA:

1. disvastigi la uzadon de la internacia lingvo Esperanto;
2. agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon;
3. plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo;
4. kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco, kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj.

Por pliaj informoj, haveblaj ĉe nia riĉa biblioteko, kaj por inde kunfesti ĉi tiun gravan datrevenon, mardon la 28an ni atendas vin ĉiujn ĉe TEA-sidejo, ekde la 20a horo.




La 17an de marto 1998 Prof. D-ro Helmar Gunter Frank, prezidanto de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San-Marino, ricevis en Düsseldorf (Germanio) la Federacian Meritkrucon Unuaklasan de la Merita Ordeno de Germanio. Per tiu alta distingo la prezidento de Germanio honoras la sciencajn kaj homajn meritojn, kiujn Frank akiris ankaŭ pri la fondo de kaj en la laboro por la AKADEMIO.

Helmar Frank, naskita 1933-02-19 en Waiblingen (Germanio), studis matematikon kaj filozofion en Stuttgart, Tuebingen kaj Parizo. Post sia doktoriĝo ĉe Max Bense kaj kunlaboro kun Karl Steinbuch, li jam en 1963 estis vokita kiel profesoro al la pedagogia altlernejo de Berlino. Tie li laboris pri klerig-kibernetiko, kiun li gvidis de embrieco al matura scienco. En 1969/70 li kreis la Esploran kaj Evoluigan Centron por «objektigitaj Instru- kaj Lern-metodoj» (FEoLL) en Paderborn. En 1972 li fariĝis profesoro de la tiea universitato. En februaro 1998 li tie emeritiĝis post 35-jara profesora agado.

Komence de la jaroj 1980aj Frank kune kun aliaj internacilingvaj sciencistoj, inter kiuj la posta Nobelpremiulo Reinhard Selten, sukcesis interesi la registaron de San-Marino pri la projekto de internacia scienca universitato aŭ akademio. Tiel en 1985 povis okazi la oficiala fondiĝo de AIS. La neŭtraleco de San-Marino tiutempe faciligis kontaktojn tra la fera kurteno, post kies disfalo Frank sukcesis rapide krei oficialajn interrilatojn kun reformaj landoj, precipe Rumanio kaj tiama Ĉeĥoslovakio. Surbaze de tiuj rilatoj li kreis studplanon por la nova fako Eŭrologio, kies unuaj kursoj okazos aŭtune en la universitatoj de Sibiu (RO) kaj Nitra (SK) por eduki spertulojn pri Eŭropaj demandoj.

Kvankam Frank kontraŭas movadismon kaj verdismon kaj ne konsideras sin ano de la Esperanto-movado, li ĉiam estis preta je utila kunlaborado kun Esperanto-organizoj. En 1985 li eĉ transprenis la rektorecon de la Internacia Kongresa Universitato dum la 70a UK de UEA (Augsburg). Sub lia gvido AIS jam plurfoje okazigis sciencajn konferencojn (AIS-IKU) kadre de UEA -kongresoj.

Malgraŭ sia emeritiĝo kiel universitata profesoro, d-ro Helmar Frank akceptis plu gvidi AIS dum la tria el ĝiaj (kvarjaraj) senataj periodoj. Sub lia prezidanteco AIS ĉi-jare okazigos almenaŭ tri sciencajn konferencojn - en Rusio, Pollando kaj Italio/San-Marino - dum kiuj verŝajne ĉiuj povos profiti de lia partopreno.

## Neniu glacimonto baras la irvojon al la filmo TITANIC

En multaj landoj, tra la tuta mondo, emoci-ekscitaj sloganoj anoncas la prezentadon de la fama filmo de J. Cameroun, pri la tragedia enabismiĝo de la oceana ŝipo TITANIC. Do, konfesu ke ankaŭ vi dum 3 horoj ĝin spektadis, algluita al via kineja brakseĝo...

Nedubeblas, fakte, ĝia eksterordinara sukceso, kio certe superkompensos la elspezojn por ties produktado. Oni parolas pri «epokfara sukceso», eĉ pli evidentigita nun de la ĵus naskiĝinta generacio de TITANIC-emuloj aŭ pli bone TITANIC-maniuloj. Kaj ĝuste tiuj estas la ĉefresponsuloj de tiu grandioza sukceso. El kio konsistas tiu nova *tendenco*? Normalaj personoj, konsidere ankaŭ la esceptan filmo-longdaŭron, nur unu fojon rigardas la prezentadon, sed tiuj TITANIC-emuloj plu kaj plu reiras kinejen, kaj, religieme, sorbas du, tri kajtielpluajn spektaklojn. Sensacia novaĵo, pasintsemajna: fraŭlino spektis ĝin 45 fojojn. Ĉu gratulinda!?!

La interesiĝo pri la tragika akcidento, kiu skuis la mondon en tiu neforgesebla 15a de aprilo 1912, ne malpliiĝos en la nuntempo pro la altrudo de la kino-mondo, kiu de tempo al tempo revivigas eventojn, jam delonge kuŝintajn en la forgesujojn, por ree prezenti ilin al publiko, reveki malnovajn emociojn, antikvajn memorojn... Ja, nun estas la vico de TITANIC.

Sed ĉi tiu insista tamburado vekis en mi ian scivolemon: ĉu sur tiu transatlantika ŝipo, inter la personaro kaj pasaĝeroj (entute ĉ. 2200 personoj), eble troviĝis ankaŭ esperantist(in)o? Se jes, kia ties sorto?

Jen la trovitaĵoj, el ZAMENHOF de Marjorie Boulton kaj el la ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO: sur TITANIC estis la esperantisto William Thomas Stead, amiko de Zamenhof. Li estis *anglo, filantropo, pacifisto kaj ĵurnalisto. Naskita la 5an de julio 1849 en Embleton, li mortis la 21an de aprilo 1912 pro submariĝo de la ŝipo TITANIC. Li esperantistiĝis pro la paroloj de prof. Hartman en Leipzig. En sia gazeto THE REVIEWS OF REVIEWS li energie subtenadis Esperanton per ĉiumonata paĝo pri ĝi.*

BULTENO de la membroj de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
tel/fakso: +39 40 763128
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro
Poŝtĉekkonto N° 10834349